diskuto sub la gvido de Odd T.

La dramatiko de Ibsen (Popola malamiko, Pupa hejo kaj ev. Hedda Gabler) estas la bazo por la seminario.

Unu el la verkoj estos prezentata kiel "unupersona teatro". Kelke da tekstoj estos je dispono al la partoprenantoj en bona tempo.

Kotizo: 50 skr. Anoncu vin lastadate 11an de okt. sub adreso de Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, 292 94 HÖRBY. Telefono: (o415) 501 52. Poŝta ĝiro (por kotizo) 13 28 25-1.

AŬTUNA FESTO - lige al la seminario - sabate vespere en la klubejo je 18h00. Anoncu vin al: Ulla Ullfors, tel. (040) 49 95 39. Kotizo: 30:- ... sed vi certe pro tio ricevos "ion manĝeblan" laŭ skaniana imago.

Pri komuna vojaĝo: Kontaktu nian Inga Johanson, (031) 15 57 23.

---


KARLSKOGA
FOLKHÖGSKOLA





N:ro 4/1988 (10)

inter-LIGILO ESPERANTO

- ESPERANTISTARO DE GOTENBURGO -

Redaktas: Lennart Åberg
Pf. 55028, S-400 53 GOTENBURGO
Telefono: (031) 48 95 97 Poŝta ĝiro 33 23 31 - 8


## PREZENTADO DE MONDA ESPERANTO-CENTRO

Gotenburgon vizitos s-ino ZAFIA BANET-FORNALOWA, marde la 20an de sept., kiam ŝi prezentos la tutmondan Esperanto-Centron "ZAMENHOF" en Bjalistoko, kiu nun estas planata de Pola Esperanto-Asocio kaj Universala Esperanto-Asocio.

S-ino Banet-Fornalowa estas jam konata de multaj Gotenburgaj esperantistoj depost 1980, kiam ŝi faris unumonatan prelegadon en Okcidenta Svedio, tiam pri Janusz Korczak - fama kuracisto, pedagogo kaj verkisto.

Nun vi estas kore bonvena aŭskulti prelegon en Esperanto-Centro de Gotenburgo, Magasinsgatan 23, 20an de sept. je19hoo. Vi estos bone informata pri "Nia Komuna Esperantista Mondcentro".

## JUNULARA SEKCIO DE INTERSERVO

faris decidon pri komuna kaj konstanta tago por siaj kunvenoj, kiuj ekde tiu ĉi aŭtuna sezono okazos regule. Bonvolu telefoni al Andreas Nordström, (031) 30 20 12 por ricevi pli detalajn informojn.

## GRANDA ESPERANTO-EKSPOZICIO EN URBA ĈEFBIBLIOTEKO

En la periodo 20-31 JANUARO 1989 okazos tre ampleksa ekspozicio pri Esperanto en la granda ekspozicia halo, 160 $m^2$, kun 11 grandaj fenestroj kaj cetere tre oportuna ekiparo. La situo ĉe la Centra Kultura Placo de Gotenburgo (Götaplatsen) estas tre oportuna kaj la domo estas ĉiutage vizitata de granda publiko.

## DU AKTIVAJ AGADGRUPOJ LABORAS PRI PREPAROJ

Estas starigitaj du grupoj por fari la preparajn laborojn rilate nian ekspozicion, 20-31 januaro 1988.

Grupo 1. Dolly Carlsson, Ralf Jalming kaj Karl-Erik Peterson - kunvenas en Magasinsgatan 23 je 11h00, la 27an de sept.

Grupo 2. Samtage je 18h00 kaj samloke kunvenas grupo 2, kiu konsistas el jenaj personoj: Helen Olsson, Kent Grahn, Andreas Nordström, Christer Lörnemark, Magnus Sandelin kaj Niklas Olaison.

ALVOKO: La grupoj invitas aktivajn kaj respondecajn esperantistojn, kiuj volas partopreni la interesan kaj gravan preparadon de tiu eksterordinara ekspozicio. Telefonu al Inga Johanson por ricevi pli da informoj.

## LITERATURON NI ĈIUJ NEPRE BEZONAS

Vi certe aŭdis, ke ni esperantistoj de Gotenburgo havas je nia dipono peranton de literaturo en Esperanto, lernolibroj ktp. Faru viziton aŭ telefonu al A PIACERE, Viktoriagatan 26, telefono: (031) 11 26 30 aŭ 21 36 93.

Certaj libroj estas haveblaj en la butiko, sed vi facile povas fari viajn mendojn de kiuj ajn esperantajn verkojn.

## LA JUNULARA ORGANIZO - SEJU - JUBILEAS 30 JAROJN

Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo jam estas plenkreska! Siajn 30 jarojn la unuiĝo festos per ekskurso al Helsinki, kie la finna FEJO atendas svedajn E-junularon.

La vojaĝo okazos per ŝipo de Stokholmo la 14an de oktobro je 18h00. En Helsinki la jubileado poste sekvas la 15an kaj 16an de oktobro.

Por pli detala programo bonvolu telefoni al Inga Johanson, kiu informas pri forirtempo de Gotenburgo la 14an de okt., pri prezoj ktp. Junaj esperantistoj - jen io eksterordinara!

## 4:A ELDONO DE KATALOGO PRI ESPERANTA LITERATURO

En Gotenburgo la Ĉefbiblioteko eldonis novan katalogon pri Esperanto-literaturo, kaj beletra kaj faka. Nun la katalogo jam ampleksas ĉ. 300 verkoj, sed ĉirkaŭ 50 novaj libroj nun estas liverataj al la biblioteko. Eĉ pri ankoraŭ pli multaj libroj la Biblioteka komitato (Fonduso Nilsson) faris mendojn. Vizitu la ĉefbibliotekon, havigu al vi la novan katalogon kaj - antaŭ ĉio - pruntepreni multe kaj ofte el la granda stoko.

## STANISŁAW BURBA - VIZITOS NIN

Marde la 18an de oktobro nia pola samideano venos Gotenburgon Kelkaj el la gotenburgaj esperantistoj jam konas amikon Stanisław de pli frua vizito.

Tiun ĉi fojon nia gasto rakontos al ni pri sia hejma urbo per ĉarmaj kaj variaj diapozitivoj. Lian bonan kapablon kiel prelegiston ni jam bone konas. Plenigu la salonon tiun vesperon.

Venu, estu bonvena! La prelego komenciĝas je la 19h00. Ejo: Magasinsgatan 23.

## KARLSKOGA ESTAS JAM ESTABLITA ESPERANTO-LERNEJO

Karaj gesamideanoj! Vi certe jam scias, ke en nia lando estas jam unu Popola Altlernejo, kiu enkondukis Esperanton kiel apartan studlinion. Nia bonkonata, lerta kaj sperta samideano Lars Forsman - respondeca gvidanto de la Esperanto-linio - estas varmkore invitanta novajn kursanojn.

Kiel konate en Karlskoga Popola Altlernejo okazas regule 8-semajnaj kursoj. En ĉiu studsezono Lars Forsman gvidas kursojn, kaj por komencantoj kaj por progresintoj. Krome okazas unusemajnaj kursoj someraj, kiuj ankaŭ estas vere rekomendindaj por esperantistoj, kiuj bezonas refreŝigi siajn kapablojn.

Vi povas skribi aŭ telefoni al la lernejo. La adreso estas Karlskoga Folkhögskola, Box 192 (Rektor Lindholms väg 23), 691 24 KARLSKOGA. Telefono: (0586) 503 60 - Lars Forsman.

## SUDA DISTRIKTO INVITAS NIN AL LITERATURA SEMINARIO

En Malmö - pli precize en klubejo de Klubo Esperantista de Malmö, Kronetorpsgatan 94 - okazos sabate la 22an kaj dimanĉe la 23an de oktobro - kun norvega samideano, tre ŝatata kaj sperta prelegisto pri Esperanto-literaturo kiel gvidanto - seminario pri Esperanto-literaturo.

Ni en Gotenburgo tre bone konas la kapabecojn de nia kara

ODD TANGERUD

kiu en Malmö prezentos norvegan poezion, norvegan arton de rakontado. La seminarianoj dediĉos sin al analizo kaj

# HÖSTENS ESPERANTO-KURSER

STUDIEFÖRBUND:

| | | |
|---|---|---|
| ABF: | "PRÖVA-PÅ-CIRKEL" | MÅ 18:30 |
| tel 17 40 10 | FORTSÄTTNINGSCIRKEL | - |
| MEDBORGARSKOLAN: | NYBÖRJARCIRKEL | TO 18:30 |
| tel 81 53 00 | | |
| STUDIEFRÄMJANDET: | KONVERSATIONSKURS | MÅ 12:30 |
| tel 48 95 97 (Åberg) | | |

GÖTEBORS ESPERANTOFÖRENING:

| | | |
|---|---|---|
| MAGASINSG 23 | FORTSÄTTNINGSKURS | ON 17:15 |
| tel 91 85 54 (Sandelin) | | |

# ÖPPET HUS!

VÄLKOMNA TILL ESPERANTOCENTRO PÅ MAGASINSG 23 (ARBETAR-INSTITUTETS HUS) MÅ 5 SEPT KL 18-20!